# *UN opozicias al uzo de perforto kaj terorismo en Venezuelo.*



Nov-Jorko, 29 jun (RHK) UN rifuzis la atakon kontra? la supera tribunalo de justico kaj la ministerio de internaj aferoj, justico kaj paco okazinta en Karakaso, kaj esprimis sin kontra? kiu ajn perforta agado en Venezuelo, konfirmante ke ili atente sekvas la evoluon de la politika kaj socia situacio en tiu lando.

Reprezentanto de António Guterres, la ?enerala sekretario de UN, sinjoro Stéphane Dujarric, esprimis ke evidente  tiu institucio internacia firme opozicias al ?iuspeca perforto  kie ajn.

?i-pasintan mardon, la ministro pri komunikado kaj informado, Ernesto Villegas, sciigis ke la flugaparato ?telita de la aera militbazo  La Carlota, pafis 15-foje en la ?irka?a?oj de la ministerio de internaj aferoj, kaj poste flugis super  la  tribunalo, kie estis lan?itaj kvaj larmigo-bomboj. La flugaparato estis eltrovita ?i-merkede.

[https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/134154-un-opozicias-al-uzo-de-perforto-kaj-terorismo-en-venezuelo](https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/134154-un-opozicias-al-uzo-de-perforto-kaj-terorismo-en-venezuelo)

# Radio Habana Cuba